

La Esperanto-Gironde Informilo

FEBRUARO 2018



N° 153

Nemaltrafende!



2a-7a de majo 2018

ESPERANTO GIRONDE

19an de novembro 2017 je la 10a30

en CREON

Ĉeestas: Annie kaj Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine kaj Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Edelbloude, Bruno Ferré, Gérard Gajac, Ivan Iouoroff, Peio Labbé, Joël Lajus, Claudine Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernard kaj Rose Sarlandie, Morine Stride,

Senkulpigitaj: Michel kaj Christiane Jagueneau

Ĉiu sin prezentas.

Elvezio salutas ĉiujn kaj dankas al Morine kaj Peio pro ilia gastigado.

La ĉefa afero estas la organizado de la datreveno de Esperanto-Gironde. Cetere estas aliaj diskutendaj aferoj, pri kiuj oni jam diskutis dum la antaŭa kunveno.

Anoncoj: - prelego de Christian Lavarenne la 22an de novembro pri Zamenhof: Elvezio ĉeestos kaj bezonas broŝuretojn pri Esperanto por disdoni ĉiokaze. Estas kelkaj en Cenon.

- Fino de la Zamenhofa jaro en Parizo, la 21an de decembro, kadre de UNESKO. Tiu evento estas organizita de la poloj kun UEA. Okazos prelegoj pri diversaj temoj, interalie UNESKO-gazeto en esperanto. Elvezio ĉeestos. Eblas aliĝi ĝis la 5a de decembro.



Morine prezentas plurajn aferojn:

- la T-ĉemizoj kaj la banderolo
- la projekto pri la retejo de Esperanto-Gironde

1/ Proposition de drapeau

Pied + mât: 2,90m. Le pied est à remplir d'eau ou de sable. Mât en plusieurs pièces.

Voilure : 2,20m x 0,55m

Le prix de 180€ a été approuvé lors de la dernière réunion.

Le drapeau peut être stocké à l'université.

Morine fait circuler la maquette de la voilure. On demande que soit ajoutée l'adresse du site d'Espéranto-Gironde (esperanto-gironde.fr)

Les T-shirts sont en attente.

2/ Présentation du site

Un cousin de Morine, Aurélien, l'aide à construire le site, auquel est associé un blog.

Morine nous montre la page d'accueil.

Il est décidé que le site soit par défaut en français, plutôt qu'en espéranto, pour permettre à ceux qui ne connaissent pas l'espéranto de le découvrir.

- La page d'accueil propose le choix entre le français et l'espéranto.

- A propos : présentation de l'association.

- Contact : la photo est un exemple, elle peut être changée

- Blog : quelles rubriques ? Il existera des rubriques avec des pages fixes.

Le blog présente un menu déroulant : actualités, événements etc.

Liens vers le site des Kompanoj et vers LEGI

La gestion du site : Les administrateurs sont Aurélien et Morine. Les rédacteurs recevront un code d'accès pour leur propre rubrique.

La rubrique LEGI sera gérée par Yannick et Janine.

Jean-Seb : Il faudra veiller à ce que le site soit régulièrement alimenté. Il se propose pour participer à une rubrique « Débat »

Rubriques Evénements ; Actualités ; Rencontres ; LEGI...

La rubrique Evénements pourra annoncer ce qui se passe à l'université, la vie de l'association, les conférences, les concerts...


On réfléchit sur la question de savoir si le site doit être privé (réservé aux membres) ou public. Par exemple, tous les articles de LEGI ne sont pas intéressants pour les gens extérieurs. On décide que le site doit être public. Les visiteurs liront ce qui les intéresse...

Adresse de contact : kontakto@esperanto-gironde.fr

Rôles :

Janine et Yannick, Jean-Seb, se proposent comme superviseurs français et espéranto ; **Marcelo** comme superviseur espéranto.

Jean-Seb et Elvezio se proposent pour une rubrique « Courrier des lecteurs » en espéranto, et **Morine** pour la même rubrique en français.



Le coût annuel de l'abonnement pour le site et le blog est de 49€ la première année. On pourra peut-être trouver moins cher l'année suivante. Morine en fait don pour la première année.

Rubriques :

- Turismo (Gvidlibro) -> randonnées ; visites ; patrimoine...
- Histoire de l'association / Archives -> événements espéranto qui se sont passés en Gironde ; portraits d'espérantistes girondins ; histoire de l'association depuis 1962-1963 et histoire de l'espéranto en Gironde avant.
- Kulturo : on pourra y insérer les fiches sur les fleurs de montagne (Kiam naturo helpas praktiki Esperanton kaj reciproke).

Liens vers lernu.net, Kvinpetalo, Grésillon, associations d'espéranto...

Jean-Seb suggère qu'il y ait une rubrique du blog du type « Foire aux questions ».

Morine propose que tous ceux qui sont volontaires pour intervenir sur le site ou le blog forment une commission et se réunissent pour concrétiser les différents projets.

La page Facebook : **Bernard** pense qu'il ne sera plus utile de l'alimenter.


Suggestion de **Marcelo** : Reporter sur la 4^{ème} de couverture de LEGI la date et le lieu de la réunion suivante, dans la mesure où ils sont connus.

3/ Projet de la Jubilea Festo.

L'après-midi, **Marcelo** présente le projet, en l'état actuel.

Dates : du 2 au 6 ou 7 mai 2018.

Présentation de l'animation *50 minutoj / 10 ideoj* : un tableau sera affiché dès le début ; les gens s'inscrivent et chacun disposera de 5 minutes pour présenter (en espéranto) une idée aux autres. Le temps doit être absolument respecté. Cette animation se passe l'après-midi, de 14h05 à 14h50. On peut présenter ce que l'on veut (une idée, une peinture, une chanson...). On pourra tester lors de la réunion du 17 décembre.



Ludo 50 minutoj / 10 ideoj

A cette occasion, on pourra célébrer l'anniversaire de Laura Vieillefond, qui vient d'avoir 100 ans. Marie-Hélène se renseigne auprès de la mairie de Sainte-Foy et auprès de la famille.

En revanche les nouvelles de Michel Lavergne ne sont pas bonnes.

La réunion de janvier aura lieu à Montendre, à l'occasion du concert de Morine. Réunion à partir de 14h (concert à 20h30).

Marcelo doit visiter avec le concierge le Château du Diable, pour vérifier s'il y a des couverts, assiettes etc.

Kajto sera à la salle Simonne Signoret le 2 mai et à Cambes le 5.

Les deux municipalités par leur participation paient les frais de déplacement. Il reste pour nous les frais d'hébergement et de séjour.

Les repas : ils pourront être fournis par le SIREC, pour les jours où l'on est au Château du Diable. **Morine** propose de se renseigner pour les repas de mercredi et jeudi. Près de la Bourse du travail il y a un traiteur et une cafétéria.

Pour l'hébergement, il y a possibilité de garer des camping-cars sur le parking du Château.

Pour les autres, il existe une résidence hôtelière, Study Hôtel : il faut réserver rapidement. Il faut aussi établir très rapidement les données pour les bulletins d'inscription.

Morine suggère de joindre à la documentation un plan de la ville avec les possibilités d'hébergement, et un plan des bus et trams ; se renseigner sur les Pass TBM.

Programme :

- Mercredi : la salle Signoret se trouve derrière la mairie de Cenon.

Après-midi : - projection du film *Espéranto*.

Bernard propose que sur le bulletin d'inscription on ajoute une invitation à participer à une manifestation Espéranto le 1^{er} mai.

- Kajto, peut-être dès 18h.



Kajto

Chacun apporte son pique-nique.

- Jeudi et jours suivants : petit-déjeuner. La commission « repas » étudie la question. On demandera de préciser sur le bulletin d'inscription le nombre de repas de chaque catégorie.

Les journées commencent à 9h30.

- Jeudi : Bourse du travail (le Château du Diable n'est pas libre) :

Visite de la Bourse du travail : au moins une heure et quart. La visite se fera en français avec distribution de documentation en espéranto. Cette journée doit être ouverte aux employés comme journée de formation. Marcelo va être agréé par le syndicat Solidaires comme formateur espéranto. Les journées du 3 et du 4 mai seront ouvertes aux non-espérantistes (journées de formation syndicale).

-Samedi : conférence en espéranto par Janine et Yannick sur la création et l'animation d'un cinéma. Durée : environ 50 minutes. Possibilité de projeter des photos.

Le concert des Kompanoj dépend des réponses de FaMo, Bernard Legeay et Pierre Bouvier. Pour l'instant seul Bernard a répondu. Le concert peut avoir lieu de 16h à 18h.

Morine prépare une conférence sur l'approche culturelle et psychologique de la langue et sur l'attrait et la facilité de l'espéranto.

On peut prévoir aussi un *kunkantado* avec Kajto. D'autre part, Marie-Hélène peut présenter des contes. Serge Sire prépare une animation sur la bande dessinée.

- Dimanche : visite de Bordeaux (mascarons) et/ou des bassins à flot.

Pour le logo à thermocoller sur les sacs, il faut prendre contact avec Bernard Vidal.

Vinko et Vito Markov seront présents à la fête.

Janine



KUSPE!

Mi malkovris tiun vorton dank'al niaj eŝkaj geamikoj. Tiel titoliĝis ilia informilo fine de la okdekaj kaj komence de la naŭdekaj jaroj de la antaŭa jarcento. Dum tiuj jaroj junulara grupo forte aktivadis en Vitorio. Jam tiam ekplaĉis al mi tiu vorto: kuspe.

La difino de PIV precizigas ĝian signifon: « Laŭ kontraŭnormala direkto: *kuspe faldi manikojn; brosi kuspe ĉapelon, veluron* »

Sed oni ankaŭ diras: *kuspe karesi la harojn de kato*. Tial tiu vorto estas ligita ankaŭ al katoj, bestoj, kiujn mi amas. Ili akompanis mian vivon kvazaŭ seninterrompe jam de mia infanaĝo.

Kuspe iel povus kvalifiki sintenon, kiun mi ŝatas adopti en la vivo. Tiun ofte memelektitan de kato.

Kompanoj aŭ kamaradoj, unuiĝu, solidaraj por progreso per esperanto. Kuspe!

Marcelo



KUSPE

Kompanoj

Unuiĝu

Solidaraj

Progreso

Esperanto


ESPERANTO GIRONDE
17an de decembro 2017 je la 10a30
en CENON PALMER

Ĉeestis: Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Edelbloude, Bruno Ferré, Peio Labbé, Joël Lajus, Claudine Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Morine Stride

Senkulpigitaj: Elvezio Canonica, ge-Jagueneau

1/ Pri Laŭra

Laŭra ne estis sufiĉe forta por veturi de Marmande ĝis Sainte Foy. Do ni ĉiuj subskribas gratulan leteron por sendi al ŝi.



Speciala Zamenhof-tago ĉijare por **ESPERANTO-GIRONDE**,
kiu honoras en 2017 la **CENTJARIĜON**
de la forpaso de **Ludoviko** kaj de la naskiĝo de **Laŭra**!



GRATULOJN LAŬRA!

2/ La retejo

Morine nous informe que depuis la dernière réunion, le site a avancé. Les rubriques du blog ont été attribuées. Seul l'auteur (avec son identifiant et son mot de passe) peut apporter une contribution à une rubrique.

3/ Le drapeau

Morine présente le drapeau déplié, fixé sur son mât.

4/ Jubilea festo

Marcelo propose un jeu à 14h : il s'agit de présenter en espéranto un sujet en cinq minutes précisément.

Evolution depuis la dernière fois :

- Les concerts de Kajto sont validés, les affiches sont en cours de création.
 - Pour les Kompanoj, FaMo et Pierre demandent que l'on fournisse du matériel de sonorisation de la voix. Nous attendons la fiche technique.
- Morine et Bernard S. disposent de matériel (ampli, micro, baffles sur pied).
- La conférence musicale de Morine est traduite (groupe du lundi à Cenon). Reste à distribuer « qui lira quoi ».
 - Journée à la Bourse du Travail (jeudi) :
 - accueil par la CGT
 - visite de la Bourse
 - table ronde intersyndicale
 - repas
 - visite du quartier Art Nouveau / Documentaire de Dominique Gautier + cours d'initiation
 - Concert de La Kompanoj

Bernard précise que la CNT n'est pas admise à la Bourse du Travail.

Repas du jeudi : des tables et des chaises peuvent être installées dans le hall ; il existe plusieurs restaurants dans le quartier, mais nous serons trop nombreux. Il existe un traiteur à proximité (7€).

Janine informe que l'on pourra peut-être projeter un court-métrage sur Van Gogh, doublé en espéranto (négociation et travail en cours) ; d'autre part Serge Sire peut imprimer les brochures etc. pour un coût modique.

- Finances :

Actuellement le projet présente un déficit d'environ 600€.

Pour la logistique, on devra se limiter à une cinquantaine d'inscriptions. Tout le monde paie, y compris les organisateurs (mais pas les artistes).

Repas SIREC : pour les trois jours : 6 ou 7 (si jeudi midi). Et le mercredi soir ?...

Transports : voir avec TBM (tarifs réduits pour les grands nombres) 4 trajets. (12,90€ la carte de 10 voyages / ticket pour un voyage : 1,60€).

Sacs : La dimension A5 est choisie pour le logo.

- Recettes : Demande d'une subvention à SAT-Amikaro pour la préparation de la jubilea festo d'Espéranto-Gironde (association liée à SAT et SAT-Amikaro), la journée de formation syndicale et la participation au CD Brel en espéranto.

Bernardo suggère à Morine de faire une demande de subvention au Conseil départemental.

A 14h, après le repas, place au jeu proposé par Marcelo : « 50 minutoj / 10 ideoj » :

- Bernard S. (pri mortopuno kontraŭ soldatoj dum la unua mondmilito)
- Claudine (pri vojaĝ-anekdotoj)
- Joël (pri ekologio)
- Morine (pri feliĉo)
- Marcelo (kvizo pri mistera bildo)

Après le jeu, **Marcelo** propose, puisque c'est le Zamenhof-tago, un diaporama sur Lydia Zamenhof.

Prochaines réunions :

- samedi 20 janvier à Montendre, à 14h30
- dimanche 11 février (Créon)
- dimanche 11 mars (lieu à déterminer)
- dimanche 3 avril (lieu à déterminer)
- dimanche 29 avril (lieu à déterminer)

Janine



Lidja Zamenhof

GRAND ORIENT DE FRANCE

Abattre les murs entre les hommes

Philippe Fousquier, Grand Maître de France depuis août dernier, était à Sainte-Foy-la-Grande la semaine dernière afin de saluer l'entrée de Laura Vieillefond dans la Loge Travail et Progrès.

Béatrice FERRER

Philippe Fousquier, président du Conseil de l'Ordre du Grand Orient de France, était à Sainte-Foy-la-Grande la semaine dernière, sa première visite en Gironde depuis son élection, pour saluer l'entrée d'une nouvelle sœur, Laura Vieillefond, qui, ce dimanche, rejoint son mari Pierre et conserve la double appartenance avec sa Loge bergéroise l'obédience mixte du Droit Humain. Née à Cleveland en 1917, Laura est arrivée à Sainte-Foy-la-Grande dans ses années vingt avec ses parents. Son nom de jeune fille est Sapoznik, son père était né à Vilnius. Laura Vieillefond a marqué le Pays foyen et tous ceux qui l'ont rencontrée de l'impression de sa volonté, sa pugnacité, son enthousiasme à défendre les causes



Laura Vieillefond en 1943
Grand Maître de France



Témoin engagé du siècle passé, Laura Vieillefond a gardé intacte la volonté de faire avancer les causes qui lui semblaient justes.



Philippe Fousquier, Grand Maître, président du Conseil de l'Ordre qui rassemble 55 000 adhérents, entouré de Xavier Chabot-Chouvier, 2^e Grand Maître adjoint et de Franck Chabot-Berrier conseiller.

des autres, faite de générosité, d'altruisme, de solidarité et de franchise. Le Grand Maître du G.O.D.F. a eu un adret et pour un an a répondu volontiers à l'invitation de cette loge témoin d'une tradition maintenue à 1740. Il rappelle dans cette année de célébration du tricentenaire de la maçonnerie moderne, qu'il s'agissait d'abattre les murs entre les hommes. « Un endroit où les hommes séparés à l'étranger par leur statut, leur métier, leurs origines se retrouvaient pour un dialogue et un échange entre égaux ». « Ce message reste moderne, notre ambition est de faire vivre cette fraternité ». Cet hommage à Laura Vieillefond rappelle

que l'obédience a ouvert sa porte aux femmes en 2011 seulement. « Mais en 6 ans, 2 500 sœurs ont été accueillies dans 600 loges ». Cette fraternité rassemble beaucoup de courants d'opinion mais compte toujours deux ennemis : l'idéologie d'extrême-droite et l'intégrisme religieux. « Nous sommes des républicains ardents, pour une république indivisible, laïque, démocratique et sociale... ».

(1) Travail et Progrès est l'héritière d'une des plus anciennes Loges adhérentes de la Fédération du Grand Orient de


France. Ses origines remontent à 1742, soit au tout début de la franc-maçonnerie en France. Elle est aussi l'une des quelques-unes de Gironde à accueillir des femmes dans ses rangs.

2) On peut découvrir Laura Vieillefond, ses combats, sa formidable énergie, dans un film réalisé par Christian Auc-kenthaler dans la série « Passions de mémoire », une commande de la communauté de communes du Pays foyen. b. f. f. p. s. : / / w w w . y o u t u b e . c o m / watch?v=U...RfobBr...0

Mais aussi dans un article que M-C Boisseau lui consacre disponible en ligne sur le site de la Société historique des Amis de Sainte-Foy.

En Ĝirondio de la 2a ĝis la 7a de majo 2018

Merkredo la 2an en la koncertejo Simone Signoret ĉe la urbodomo de Cenon (33150)
Ĵaŭdon la 3an en la bordoza laborborso (44 kurso Aristide Briand – 33000 Bx) (*urba tramo*)
De vendredo ĝis dimanĉo en la Kastelo de la Diablo (88 kurso Victor Hugo en Cenon)
Sabaton la 5an vespere en la vilaĝa festsalono Bellevue de Cambes (33880) (*speciala buso*)



PARTOPRENU! Tio signifas venu aktive kunvivadi kvin neforgeblajn tagojn.

Riĉenhava
kultura
programo!

ESPERANTO-GIRONDE sperta organizema asocio bezonas vin por festi sian 50an jaron.

Ĉu vi bezatas, ĉar vi timas enuon? Vidu do la mozaikan programon: kunkantado kun nepapagaj artistoj, riĉenhavaj debatoj, neordinaraj prelegoj, publikaj koncertoj, serioza intersindikata kleriga tago, esceptaj vizitoj. Aŭ ĉu timas vi tro altajn kostojn? La kotizo kaj manĝoprezoj dorsflanke indikitaj kvietigos vian monujon. Tio dank' al libervolaj kontribuantoj!

1968 - 2018

Aktive partopreni signifas ne nur esprimi sian opinion dum debato, kunkanti sed ankaŭ kunhelpi en la praktikaj ĉiutagaj taskoj: manĝopreparado, telerlavado, salonoreordigado, ktp. La etoso estu partigo de la laboro en plaĉa harmonio kiel tiu de kunplezuro dum la distraj tempoj.

Alvoko al
bonvolemaj
helpontoj!



Pri manĝoj: Ilin preparos loka publika kuirejeco, kiu liveras ĉiutage 5500 manĝojn en lernejsajn, maljunulajn kaj oficistajn restoraciojn. Ni mem devos revarmigi la pladojn, pretigi la tablojn, ktp. Ili estas viandenhavaj. Memzorgantoj rajtos uzi la komunan kuirejon.

Printempa
florado por
naturamiko!

Pri tranoktadoj: ne staras hotelo tuj ĉe la kastelo. Tial ni konsilas al eksteruloj rapide rezervi dormĉambrojn ĉe: Studyhôtel de apuda urbo Lormont <http://www.studyhotel.fr>. Facile atingebla kaj ne tro kosta hotelo (ĉambro kun du unuopaj litoj: po 45,-€ nokte). Indiku ke vi rezervas nome de Esperanto-Gironde, se deko da ĉambroj rezervitaj, rabato proponata. Atentu: nepre menu viajn matenmanĝojn ĉe la kastelo de la Diablo. Malpli kostas kaj la etoso estos freŝe verda jam frumatene!

Danteca
infero por
satanoj

Venu por kanti kaj danci: kun **KAJTO** kaj **LA KOMPANOJ** dum tri publikaj koncertoj sed ankaŭ dum privataj atelieroj. Venu amuziĝi per nekutimaj ludoj kaj animadoj.

Nuntempa strebo de la organizantoj: specialaj tagoj por laboristoj! Ni celas, ke laboristoj enskribiĝu en la unuaj oficialaj **SINDIKATAJ KLERIGOTAGOJ POR-kaj PER-ESPERANTAJ**. La 3a kaj 4a de majo estu por vi pagotaj tagoj ekster via laborejo krom viaj normalaj ferioj. Vi scias, ke en Francio ĉiu laboristo, dungita aŭ ne, sindikatista membro aŭ ne, rajtas partopreni en sindikataj klerigotagoj – *jours de formation syndicale* – (maksimume 12 tagoj ĉiujare). Kondiĉo: per speciala aliĝilo vi petu permeson al via laborestro almenaŭ unu monaton antaŭ la evento. Do antaŭ la 3a de aprilo 2018. Se konfirmota, interesatoj rekte ricevos la bezonatan formularon. Kun precizigoj konfirmote... aŭ ne! Ja ne nur ni decidis tiurilate.

+ Speciale
preparitaj
surprizoj

Ĉiuj informoj kaj aliĝilo elŝutebla ĉe esperanto-gironde.fr
@dreso: klodin@esperanto-gironde.fr



Aliĝilo al la 50jara jubileo de **ESPERANTO-GIRONDE**

02-07a de majo 2018

sendenda aŭ perpoŝte al Claudine Pomirol

Chemin de l'Hortie 33880 Cambes

aŭ perrete al klodin@esperanto-gironde.fr

Atentu!

*Ni konsilas fruan aliĝon, tial ke la nombro da partoprenontoj estas limigita!
Krome la manĝoj ne plu estos mendeblaj post la 15a de aprilo 2018.*

1- persona kaj familia nomoj _____

2- persona kaj familia nomoj _____

adreso _____

retkontakto _____

telefono _____

planita alveno - tago _____

proksimuma horo _____

kotizo						po	sume
senpaga por lernantoj, studentoj, senlaboruloj. Por la ceteraj:						x	15,00€
Speciala kotizo por tiuj, kiuj entute rifuzas kunhelpi la grupon por la hejmtaskoj kaj postulas servon de profesiuloj dum sia restado						x	5 000€
nombroj da manĝoj							
	ĵaŭde 3/5	vendrede 4/5	sabate 5/5	dimanĉe 6/5	lunde 7/5	po	
matene	memzorge +	+	+	+	+	x	2,50€
tagemeze		+	+	+		memzorge x	6,80€
vespere	memzorge +	+	+			memzorge x	6,80€
ekskursoj							
	Ĵaŭ 03/05 9:15 per tramo al la bordoza laborborso					x	3,00€
	Dim 06/05 14:00 per tramo al bordoza nova kvartalo					x	3,00€
	sumo =						
	eventuala subteno						
	pagota sumo =						

Ĉeko al: **ESPERANTO-GIRONDE**

prefere antaŭ via alveno al Morine Stride - 17 rue Voltaire 33670 Créon

viaj rimarkoj:

1a de MAJO: *ESPERANTO-GIRONDE* informas, ke esperantistoj grupiĝos sub propra banderolo okaze de la laborista manifestacio en Bordoza. Bonvenas ĉiuj subtenantoj! Anoncu vin!

ESPERANTO GIRONDE
20an de januaro 2018 je la 14a30
en MONTENDRE

C eestis: Annie Brilleaud, JanSeb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Bruno Ferré, Gloria Gargallo, Christiane Jagueneau, Michel Jagueneau, Peio Labbé, Lucienne Laroche, Claudine Pomirrol, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Maeva Sarlandie, Rose Sarlandie, Morine Stride

Senkulpiĝis: Bernard Vidal, Martine Edelbloude

1/ Organizado de la maja festo

- **Marcelo** informas pri la lastaj respondoj ricevitaĵoj nur la antaŭan tagon pri ebla organizado de klerigtago.

La laborplano estas projekciita sur muro.

- Kulturprogramo en Cenon: vidu kelkajn allogajn erojn en p.17-18.

- Cambes pagos 600€ por la koncerto de Kajto (sabate)

- Merkrede: En Cenon: je la 18a30, unua parto, Kajto koncertas.

Poste, solenaĵoj ĉirkaŭ aperitivo (bonvenigo de la urbestro).

Dua parto, Kajto denove.

Vespermanĝo, propono de ekologia manĝo preparita de apuda AMAP (konfirmota)

Poste, provludo de la Kompanoj.

- Bezono de materialo por la Kompanoj: Bruno jam alportis mikrofonon. Morine, Marielen kaj Yannick proponas siajn son-sistemojn. FaMo devas diri ĉu ĝi taŭgas.

- Animado: promenado en Parko Palmer. Monique rigardu la programon por fiksian plej favoran momenton.

Jaŭde: duhora promenado en Bordofo. Nepra bezono de volontulo por gvidi la grupon.

(Bernardo kaj Marcelo tiam deĵoros kun la sindikatoj.)



Prezentado de la laborplano

- Propono de **Gloria**: vizito de vinkastelo en Haux (Château Lamothe), originalaj vinkeloj en ŝtonminejo.
- Muzika prelego de Morine: Traduko finita; lasta aranĝo dum la lunda cenona kurso.
- Alternativa programo jaŭdon vespere en «Athénée libertaire». Konstruigaj interŝanĝoj.

Gloria prezentos libron: *Aymare, une collectivité anarchosyndicale dans le Lot*; Olivier Hiard, Editions Libertaires.

- **Klodin'** informas pri sia jam farita laboro koncerne la sakojn, la interŝanĝojn kun Bernard V.



Annie kaj Rose finkudras sakojn, kuraĝigitaj de Maeva

- **Rose** pretas fiksi la markojn. Nepra bezono de rekta interŝanĝo inter Rose kaj Bernard V.

Rose kaj Annie helpas por la lastaj finaj prilaboradoj de kudrado. Ankaŭ **Monique kaj Martine**.

- **Marcelo**: bona evoluo de la laboro pri la historio de la movado en Ĝirondio. Ankaŭ pri la broŝuro.

- **Morine** kontaktis turismoficejon kaj tramoficejon. Mendotaj mapoj (Bordoza, Ĝirondio) kaj broŝuroj (ĉirkaŭ 80).

- **Gloria** informas pri ebleco turni sin al biblioteko de Lormont.

- Retejo: aldoni elŝulteblan aliĝilon (PDF)

Morine vidos kun la informadikisto por kelkaj lingvoaranĝoj.

2/ Diversaĵoj:

- Informo de Esperanto France pri kongreso en Zweibrücken (Pentekoste)
- Bernard prezentas informon pri turneo sendita de Y. Nicolas, de bulgaro Georgi Mihalkov, fine de majo. Pro nia festo komence de majo, nia grupo ne povas engaĝiĝi ĉijare.

3/ Distra parto:

- Bernard S. amuzas nin per la enigmo «Ĉu vi scias, kial la kokido trairas la vojon?» Pluraj respondoj taŭgas. Dependas de la pensulo... Ni lasas vin cerbumi antaŭ ol (eble, iam...) doni al vi la solvon.



- Evidente ni ne maltrafis kune partigi bongustajn reĝkukojn, kiujn nia Montendra grupo tre afable donacis al ni.

La venonta kunveno okazos la 11an de februaro kaj la sekva la 11an de marto, loko konfirmota.

- Post la kunveno, ni kune vespermanĝis kaj kiel kutime frandis bonajn pladojn antaŭ ol iri en la preĝejon de Montendre por aŭskulti la koncerton de Morine kun ŝia pianistino Christine.

Ni pasigis agrablan tempon tra barokaj, romantikaj, pli modernaj arioj, kiujn Yannick prezentis, kaj Morine kantis por ni.

Dankon, gratulojn kaj aplaŭdojn al niaj gastoj kaj artistoj.

Klodin'



Morine kaj Christine dum la koncerto

50jara jubileo de ESPERANTO-GIRONDE

programo de la festo de la 2a ĝis la 7a de majo 2018

Kelkaj allogaj eroj:

Merkredon 2an de majo

en la festosalono Simone Signoret ĉe la urbodomo de Cenon
1 avenue Carnot - 33150 Cenon

18:30 - publika senpaga koncerto de *Kajto*

21:00 - kunkantado/provaĵo de *La Kompanoj* ĉirkaŭ *FaMo*, *Pjer* kaj *Bernardo*

Ĵaŭdon 3an de majo

en la bordoza laborborso

Bourse du travail - 44 cours Aristide Briand – 33800 Bordeaux

9:45 - vizito de la bordoza *Labor-Borso* gvidata de *Bernardo Sarlandie*

11:00 - intersindikata rondo: la sindikata movado internaciskale

14:00 - laŭvole ĉu filmo *Esperanto* de D. Gautier, ĉu gvidata (aŭ libervola) promonado tra la kvartalo

15:00 - e-kurso por sindikatanoj

16:00 - koncerto de *La Kompanoj* ĉirkaŭ *FaMo*, *Pjer* kaj *Bernardo*

en la liberecana rendezuejo

7 strato de la konvalo – 7 rue du muguet 33000 Bordeaux

18:00 - filmo *Esperanto* de Dominique Gautier

20:30 - *Ree al fonto, rilatoj inter la esperanta kaj liberecana movadoj*: interŝanĝoj kaj interveno de *Gloria Gargallo*.

Vendredon 4an de majo

en la kastelo de la Diablo – 88 cours Victor Hugo – 33150 Cenon

10:00 - *Kial agi por laborista esperanto-asocio?* debato animata de *Marielen* kaj *Vinko*

10:00 - vizito de *vinkastelo Pascot* en Latresne kun senpaga gustumado

11:00 - *Danta Infero* prelego de *Elvezio Canonica*

14:00 - *Historio de esperanto en Ĝirondio*, prezento de *Marcelo*

15:00 - kunkantado kun *Morine* kaj *Christine* (piano) kaj *La Kompanoj*

16:30 - *Modernaj fabeloj* rakontitaj de *Marielen'*

17:30 - Popoldancoj kun *Kajto*

20:30 - mallongdaŭra filmo *Van Gogh*

20:45 - *Historio de la muziko* kanta prelego de *Morine Stride* akompanata de *Christine Guillot* (piano) kaj tri Kompaninoj: *Monique Dussenty*, *Martine Edelbloude* kaj *Klodin' Pomirolo*

Sabaton 5an de majo

en la kastelo de la Diablo – 88 cours Victor Hugo – 33150 Cenon

10:00 - *Kiam naturo helpas praktiki esperanton kaj reciproke!* pri montaraj floroj fotitaj de *Klodin'* kaj *Marcelo*

11:00 - kunkantado kun *Kajto*

14:00 - *Remu, remu!* luda remkonkurso, animado de *Klodin'* kaj *Marcelo*

15:00 - *Kreado de bildstrioj* far *Serĝo Sir'*

16:30 - *50 minutoj, 10 ideoj!* kolektiva animado sub kontrolo de *TempoMajstro*

17:30 - *Kreado de kinejo*, sperto de *Janine Dumoulin*

en la festosalono Bellevue en Cambes (33880)

20:45 - Publika koncerto de *Kajto*

Dimanĉon 6an de majo

en la kastelo de la Diablo – 88 cours Victor Hugo – 33150 Cenon

10:00 - *Kiuj peresperantaj agadoj?* interŝanĝo de spertoj animata de *Marielen* kaj *Vinko*

11:00 - *La bordozaj maskaronoj*, prezento de *Marcelo* kaj *Klodin'*

14:00 - promeno tra la nova kvartalo «bassins à flots» kun *Janseb Brilleaud*, *Annie Perrin* kaj *Emeline Dumoulin*

ie tie surstrata aŭ/kaj surkaja kunkantado kun *La Kompanoj*

20:30 - luda aŭkcio, forofero de brokantaĵoj

20:45 - *libera scenejo* de la adiaŭa vespero

Lundon 7an de majo

en la kastelo de la Diablo – 88 cours Victor Hugo – 33150 Cenon

9:30 - mense ripoziga tasko: repako, reordigado, purigado de la materialoj kaj de la lokoj





CINAMO

Cinamarbo estas arbeto, kies ŝelo estas uzata. Tiu ŝelo aspektas kiel tubetoj, kiuj rezultas el memvolviĝo.

Ĝi ekkreskis sub la Cejlona suno sed ĝi nun troveblas ankaŭ en Ĉinio, Madagaskaro, Brazilo kaj Martiniko.

Cinamo estas mondscale la plej uzata spico post la nigra pipro. Ĝia parfumo estas agrabla kaj ĝia gusto dolĉa kaj aroma.

Pluraj esploroj montras ĝian efikon por malpliigi la glukemian dozon ĉe personoj suferantaj pro 2-tipa diabeto kaj por redukti ventrogresaĵon.

Ĝi estas kontraŭ-bakteria, -sepsa kaj -inflama. Ĝi estas ankaŭ fungicida.

Ekzemple, ĝi stimulas sangocirkuladon (aparte periferie, ĉe man- kaj pied-fingroj), ĝi pliaktivas la sekrecion de stomaka suko. Ĝi estas kutima flegaĵo kaze de digesto-problemoj kaj mallakso. Ĝi malfortigas inflamojn kaj kramfojn.

Cinamo estas vigliga. Ĝi tre utilas al lacaj kaj konvaleskantaj homoj... kaj aparte okaze de postgripa astenio. Ĝin oni uzas por lukti kontraŭ tuso kaj rinito. Tial dumvintre oni aldonas ĝin al kukoj, tizanoj, spicvino...

Ĝi stimulas ankaŭ memorkapablon.

Infuzaĵo: 10g da cinamo en duon- aŭ kvaron-litro da akvo.

Cinama esenco: 2 gutoj da cinamo sur sukerpeceto aŭ en mielkulero. Maksimume po tri fojojn tage – ne pli ol dekkvin sinsekvaj tagoj.

Cinamo povas helpi al vi limigi damaĝojn de la festenoj:

- suko de duoncitrone en granda glaso da akvo
- unu kafkulero da pulvorigita cinamo
- unu supkulero da vinagro el cidro

Ĉiuj tiutemaj esploroj same konkludas: citrone, cinamo, vinagro, ĉiuj reduktas la efikon de troricaj nutraĵoj ĉe indico de glukemio.

Fonto: *Letero de Dro Willem – Sekreto por sano*
kaj *Letero pri optimuma nutrado*



Cinamo el Cejlono kaj el Ĉinio

MIGRANTOJ

La vero estas, ke ĉiu dramo de la migrado el malriĉaj landoj levas la demandon, kiu iam leviĝis por la enloĝantoj de Roquebillière, kiam ili donis azilon al mia patrino kaj ŝiaj gefiloj: la demando pri respondeco.

En la nuna mondo, historio ne plu dispartigas la homojn inter militaj grupoj. Ĝi metas je unu flanko tiujn, kiuj, laŭ la hazardo de sia geografia situacio, laŭ sia ekonomia potenco akirita dum jarcentoj, laŭ siaj spertaĵoj, konas la bonaĵojn de paco kaj propero. Kaj je la alia, la popolojn, al kiuj ĉio mankas, sed ĉefe demokratio.

La respondeco estas ne malpreciza filozofia nocio, ĝi estas realaĵo.

Ĉar la situaciojn, de kiuj fuĝas tiuj malfavoritoj, ja la riĉaj landoj kreis. Pro la violenta konkero de la kolonioj, kaj poste, post la sendependiĝo, subtenante la tiraniojn, kaj fine en la nunaj tempoj, instigante ekscesajn militojn, en kiuj la vivo de unuj valoras neniom, dum la vivo de la aliaj estas valorplena trezoro.

Bombadoj, celpafoj el la ĉielo, ekonomiaj blokadoj, ĉiuj rimedoj estis uzataj de la potencaj landoj por venki la malamikojn, kiujn ili identigis. Kaj ne gravas, se estas flankaj viktimoj, misaj pafoj, ne gravas, se la landlimoj estis sabre desegnitaj de kolonizado, senkonsidere pri la homaj realaĵoj.

Migrado estas, por tiuj, kiuj ĝin komencas, ne krozado por sperti ekzotismon, eĉ ne la miraĝo de luksa vivo en niaj suburboj de Parizo aŭ Kalifornio. Ĝi estas forfuĝo de homoj timigitaj, lacegaj, en danĝero de morto en siaj propraj landoj. Ĉu ni povas ignori ilin, fordirekti niajn rigardojn? Akcepti tion, ke ili estu forpelitaj, kiel nedezirindaj, kvazaŭ malfeliĉo estus krimo, kaj malriĉeco, malsano?

Oni ofte aŭdas, ke tiuj situacioj estas nesolveblaj, neeviteblaj. Ke ni, riĉuloj, ne povas akcepti la tutan mizeron de la mondo. Ke ja necesas landlimoj por nin protekti, ke ni estas sub la minaco de invado, kvazaŭ temus pri barbaraj hordoj alsturmantaj niajn kvartalojn, niajn monŝrankojn, niajn virgulinon.

Eĉ se ni konservus nur la argumenton pri sekureco, ĉu ne evidentas, ke niaj muroj, niaj pikdratoj, niaj gvatturoj estas iluziaj protektiloj?

Se ni ne povas akcepti tiujn virojn kaj virinojn, kiuj bezonas tion, pro karitato aŭ pro humaneco, ĉu almenaŭ ni ne povas ĝin fari pro racio, kiel diras la granda Aicha Ech Chenna, kiu helpas la forlasitajn infanojn de Maroko: «Donu, ĉar se vi ne faras, iam tiuj infanoj venos postuli konton de vi».

Nelga¹ historio de la mondo metas nin antaŭ du principojn kontraŭajn sed ne nerekunigeblajn.

Unuaflanke, la espero, kiun ni havas, iam krei komunan lokon por la tuta homaro. Lokon, kie regus universala konstitucio kaj ni memoru, ke la unua konstitucio certiganta la egalecon de ĉiuj homoj, estis verkita ne en Grekio, ankaŭ ne en Francio dum Klerismo², sed en Afriko, en la Malia Regno de antaŭ la konkero.

Kaj duaflanke la plifirmigo de la preventaj bariloj kontraŭ militoj, epidemioj kaj revolucioj.

Inter ĉi du ekstremaĵoj, la kondiĉo de la migrantoj nin vokas al iu pli realecema modesteco. Ĝi remetas en nian memoron la jam malnovan historion de la neegalaj konfliktoj inter riĉa lando kaj subekipita lando (Marŝalo Mobutuo, alparolante Usonon, proponis veran valorskalon starigitan ne laŭ la kriterio de ekonomia aŭ milita potenco de iu lando sed laŭ ties kapablo disdividi siajn riĉaĵojn kaj servojn, por ke estu forpelita la vorto «subevoluo», kaj ke ĝin anstataŭu la vorto «subekipado».

Ni iom post iom alkitimiĝis, de post la sendependiĝaj militoj, al tio, ke centmiloj da homoj, en Afriko, en Proksim-Oriento, en Latin-Ameriko, naskiĝas, vivas kaj mortas en tolaj kaj ladaĵaj urboj, marĝene de la prosperaj landoj. Nuntempe, kun la pligraviĝado de tiuj konfliktoj kaj la subnutrado en la malfavoritaj landoj, oni malkovras, ke tiuj homoj ne plu povas esti izolitaj. Ke ili transiras arbarojn, dezertojn kaj marojn por provi eskapi sian fatalon.

Ili frapas je nia pordo, ili petas esti akceptitaj.

Kiel povas ni repeli ilin al morto?

En sia bela libro, D-ro Pietro Bartolo citas tiun frazon de Martin Luther King, kiu neniam tiom vere sonis: «Ni lernis flugi kiel birdoj kaj naĝi kiel fiŝoj, sed neniu instruis al ni la tutsimplan arton kunvivi kiel fratoj.»

Jean-Marie Gustave Le Clezio, la 5an de oktobro 2017, je elsendaĵo «Boomerang», ĉe France Inter.

Tradukis Janine



J.M.G. Le Clezio

¹ nelga: okazinta antaŭ nelonge

² Klerismo: les Lumières




Kiel Renardo renkontis fiŝkomercistojn, kaj kiel li havis sian parton da haringoj kaj angiloj

Oni vidas, ke la vetero ne ĉiam estis tia, kia Renardo deziris, kaj liaj entreprenoj ne egale sukcesis. Kiam la mildan somerveteron anstataŭis rigora vintro, al li mankis ofte provianto, li havis nenion por doni, nenion por malkroĉi: uzuristoj rifuzis monprunton, krediton ne plu konsentis komercistoj.

Je unu el tiuj tristaj tagoj de severa malsatego, li eliris el Maupertuis, firme decidinte tien reveni nur kun plenplenaj poŝoj. Unue li enŝoviĝas inter rivero kaj arbareto en jukejon, kaj kiam li lacas pro vanaj traserĉoj, li alproksimiĝas al ŝtona vojo, kaŭriĝas en radsulko, streĉante la kolon ĉi-kaj ali-flanken. Nenio ankoraŭ prezentiĝas. Esperante iun pli bonan ŝancon, li translokiĝas antaŭ heĝon sur la flanka deklivo de la vojo. Finfine li aŭdas movon de rado: jen komercistoj, kiuj revenis de marbordo, alportante freŝajn haringojn, kiujn oni abunde kaptis, dank'al favora vento, kiu blovis la tutan semajnon; iliaj korboj krevis pro pezo de la angiloj kaj petromizoj, kiujn ili krome aĉetadis survoje.

Je distanco de arkpafo, Renardo facile rekonis petromizojn kaj angilojn. Lia plano rapide stariĝas. Li nevidate alrampas ĝis la mezo de la pado,



li etendiĝas kaj rulsterniĝas, kun la kruroj disaj, la buŝo tordita, la lango pendanta, sen movo, sen spiro. La ĉaro antaŭeniras; unu el la komercistoj rigardas, vidas semovan korpon kaj vokas sian kompanon.

- Mi ne eraras, jen vulpo aŭ melo.

- Ja, vulpo, diras la alia; ni elĉariĝu kaj kaptu ĝin; gravas ke ĝi ne eskapu.

Tiam ili haltigas la ĉevalon, iras al Renardo, lin perpiede puŝas, pinĉas kaj tiras; kaj ĉar ili vidas lin senmova, ili ne dubas, ke li mortis.

- Ni ne bezonis grandan lertecon; sed kiom valoras ĝia felo?

- Kvar pundojn, diras unu.

- Pli ĝuste almenaŭ kvin, asertas la alia. Vidu ĝian gorĝon, kiel blanka kaj vila ĝi estas. Estas taŭga sezono. Ni ĵetu ĝin sur la ĉaron.

(Daŭrigota)



Desegnis Morin'



NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 14h30 à 16h30, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)

- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono A2-107, ĉiun mardon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)



ESTRARO
de
«ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * *

Centre Culturel Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale:
347771 F Bordeaux



* * * * *

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes 17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

Kasistino: **Morine STRIDE**
17 rue Voltaire
33670 CREON
Tel: 06 10 07 08 58 / morinestride@gmail.com

* * * * *

**La venonta kunveno okazos la 11an de marto je la 10a 30 en
Cambes, en « Relais Nautique », sur la strato de la eta haveno.**

**Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al yannickdum@free.fr**

